

Amerika Esperantisto

Vol. 11

JULY, 1912

No. 6

!!! Please Excuse Us !!!

If orders sent to the AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, letters to the Editors of AMERIKA ESPERANTISTO, or communications to THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, received in Washington between July sixth and twelfth, inclusive, are not immediately given attention.

Since the officers and entire office force will be either on vacation or at the NORTH AMERICAN ESPERANTO CONGRESS in Boston during that week, no communications delivered after the last mail Friday evening, July fifth, will be seen until Saturday, July thirteenth. We beg our friends therefore to pardon us, realizing that the Congress was too great an attraction, and as it interfered with business, we were compelled of course to give up business.

As neither Mr. Edwin C. Reed, nor Dr. Ivy Kellerman-Reed (editor-in-chief of AMERIKA ESPERANTISTO) will be able to attend the INTERNATIONAL ESPERANTO CONGRESS in Cracow this summer, communications to them personally as well as to the ASSOCIATION and to the AMERICAN ESPERANTIST COMPANY will, after July thirteenth, receive prompt attention.

The next number of AMERIKA ESPERANTISTO, which will appear August tenth, will contain a full report of the NORTH AMERICAN ESPERANTO CONGRESS at Boston. The October number will be the SPECIAL NUMBER about the EIGHTH INTERNATIONAL CONGRESS in Cracow; material for this number is to be furnished by Americans who will be in attendance.

Talk About It

HE other day an Esperantist came into THE ESPERANTO OFFICE, to ask for names and addresses of any Esperantists who might happen to live in suburban towns anywhere near his own town,—or in that very town, if there were any. He wanted practice in conversation, just as everybody else does.

A clerk looked over the files, and said, "Here is one in your town, a Mr. _____, shall I give you his address?" The inquirer replied with astonishment, "Why, I know him. I didn't know he was interested in Esperanto."

Moral: If you want to meet other Esperantists, let the public know that you yourself are one! You will not need to write to THE ESPERANTO OFFICE half so

often to get "any names of Esperantists who live near here." You will find that right among your own acquaintances are people who are already interested, or who have had their curiosity aroused, and want more information but haven't yet learned where to get it. You may find the nucleus of a congenial Esperanto Club among the persons with whom you ordinarily talk about baseball news and politics exclusively, or with whom the weather has seemed so far to be the only common topic!!!

Therefore, let people know you are an Esperantist! Wear the Green Star badge, carry a few "Glimpses" in your pocket all the time, and never lose an opportunity to mention Esperanto. You will be glad you did it.

The International Money System



INCE the circulation of a magazine printed in Esperanto is international, and the activity of firms advertising and doing business among esperantists enters every country in the world, a serious problem was developed. How should one give the price of an article for sale? To give the prices in all national currencies, dollars, shillings, marks, francs, crowns, yen, pesetas, etc., would take all the space which should be given to a description of the goods! Some universally understood means of announcing the price was absolutely necessary.

A Swiss scientist solved the problem by devising an international money system, based on a unit called a *speso*. This is so small that any national value may be expressed in an even number of *spesoj*. The *spesmilo* (1000 *spesoj*), equivalent to about \$0.4875 in the money of the United States and Canada, is the unit commonly used. Ten *spesmiloj* have approximately the value of a five-dollar gold piece, twenty marks, one pound sterling, etc. The next commonest unit is the *spesdeko* (10 *spesoj*), which it will be seen is about half a cent. The abbreviations are Sm. and Sd. To roughly reduce dollars to *spesmiloj*, simply multiply by two. This system is so

convenient that esperantists are using it throughout the world, although of course it is for calculations and price quotations only, and no actual coins exist, or are in fact needed.

Some European banks issue checks in Esperanto, with the sum expressed in this system; and in London there exists a bank, known as the *Cekbanko Esperantista*, which does business exclusively in the international system, for the benefit of esperantists. Beside its checks, which are like any checks payable to the order of the payee, this bank has a second method of transferring sums, which might be worth the consideration of American bankers. It is in the form of a postcard, transferring from the payer to the payee's credit in the bank, and having space for the writing in of the articles ordered, so that no accompanying letter is needed. The time and expense saved in thus transferring small sums can be readily appreciated. A two-cent stamp instead of a five, the purchase of an international money order, the registering of the letter, and the duplicate writing of the address of the payee,—all this saving, in addition to the lack of any need of writing a letter, counts up for the average citizen, as well as for the busy commercial concern where minutes must all be calculated in dollars and cents.

Pri La Steloj

KIAM Adamo logadis sur la tero, li opiniis ke la tero estas nur malgranda ebenaĵo ĉirkaŭata de la horizonto. Supre li vidis solidan kupolon, la ĉielon, sur kiu estis alligitaj malgrandaj steloj kaj ankaŭ la "pligranda" suno kaj luno. La tero ŝajnis senmova, sed la ĉielo kune kun la steloj ŝajne moviĝis ĉirkaŭ la tero. Poste kiam la homaro pligrandiĝis kaj disiĝis oni sciigis ke la tero estas pligranda, kaj ke la suno kaj la luno moviĝas sendepende. Oni demandis, "Kial la tero ne falas?"

La saĝuloj opiniis ke grandega viro, Atlaso, subtenas la teron sur siaj ŝultroj. Poste oni demandis, "Sur kio Atlaso staras?" La saĝuloj respondis ke Atlaso staras sur la dorso de grandega testudo. Fine, kiam la homaro plisaĝigis, kuraĝuloj ĉirkaŭvojaĝis la teron, kaj oni pruvis ke la tero estas grandega globo. La mitologia grandegulo, Atlaso, estas anstaŭita de la stranga potenco, gravitado.

Per la teleskopo oni sciigis ke la suno, la luno kaj la steloj ĉiuj estas grandegaj globoj, tre malproksimaj unu de la alia kaj de la tero.

Ili ne estas alligitaj al la ĉielo sed la gravitado tenas ĉiun en ĝia loko. Se oni povus veturi per rapida vagonaro po 60 mejloj en ĉiu horo, senhalte kaj laŭ la rekta vojo, oni povus ĉirkaŭveturi la teron post 17 tagoj, sed per simila veturilo oni veturus de la tero al la luno en 166 tagoj. Postulus kvar tagojn kaj duonon por ĉirkaŭveturi la lunon. Ĉar la suno estas tre malproksima de la tero, oni veturus dum 119 jaroj antaŭ ol oni atingus tiun fajran sferon, kaj ĉar la suno estas tre grandega, la ĉirkaŭveturado postulus 5 jarojn!

Ĉirkaŭ la suno la tero moviĝas laŭ grandega elipso po unu fojo jare. Ankaŭ ĉirkaŭ la suno moviĝas simile sep aliaj planedoj, kelkaj pli malgrandaj ol la tero sed kelkaj pli grandaj. Nia hipotezia vagonaro atingus la plej malproksiman planedon, Neptunon, nur post 5,513 jaroj. Multaj malgrandaj planedoj kaj kelkaj kometoj ankaŭ ĉirkaŭiras la sunon, sed la steloj ne ĉirkaŭiras nian sunon, ĉar ĉiu stelo estas suno, aŭ pli ĝuste, nia suno estas nur malgranda stelo. Ekzistas steloj 10,000-oble pli brilaj ol nia suno. Per la plej granda teleskopo la steloj ne ŝajnas pli grandaj. Pro la grandega malproksimeco ili ĉiam ŝajnas nur punktetoj da lumo, sed per la teleskopo ili aspektas pli brilaj. Eble ĉirkaŭ aliaj steloj krom nia suno ĉirkaŭiras planedojn. Neniu scias.

Kvankam Neptuno estas tre malproksima, la steloj estas treegaj malproksimaj. Nia hipoteza vagonaro atingus la plej proksiman stelon nur post 50,000,000 jaroj. En la granda interspaco inter la planedo Neptuno kaj ĉi tiu stelo, ekzistas *neno*. Se globo $1\frac{1}{2}$ funtojn je diametro reprezentus la teron, kaj alia globo 142 funtojn je diametro, 4 mejlojn malproksima reprezentus la sunon, la plej proksima stelo estus reprezentata de grandega globo (neniu scias kiel grandega) 1,000,000 mejlojn malproksima.

Astronomiistoj kompreneble ne mezuras la malproksimecon de la steloj per

tiel malbona mezurilo kiel la rapideco de vagonaro. Eĉ la rapideco de kuglo ne taŭgas, sed la grandega rapideco de lumo bone taŭgas por ĉi tiu celo. Dum unu sekundo lumo trapasas malproksimajon kiu egalas sepoble la ĉirkaŭajon de la tero. Kuglo vojaĝus similan distancon en kvar tagoj, vagonaro en 129 tagoj. Vagonaro atingus la sunon post 119 jaroj, kuglo post $5\frac{1}{4}$ jaroj, sed lumo post nur 8 minutoj.

Malgraŭ la grandega rapideco, la lumo de nia suno atingus la plej proksiman stelon nur post 4 jaroj kaj 4 monatoj. Ĉu aliaj steloj sin trovas apud tiu stelo? Ne, ĉiuj steloj estas pli malproksimaj de ĝi, ol ĝi estas de nia suno. La grandega distanco kiun lumo trapasas dum unu jaro oni nomas "unu lumjaron." En la distanco de 15 lumjaroj de nia suno ekzistas nur 14 steloj krom nia suno, kaj se ni serĉas 10 lumjarojn pli malproksimen ni trovas nur 14 stelojn plu. Oni povas kalkuli la distancojn de nur kelkdekoj de steloj. La "norda stelo" estas 47 lumjarojn, kaj Arkturuso 160 lumjarojn malproksima. Ĉiu stelo moviĝas laŭ sia propra vojo, kelkaj alproksimiĝas la teron per grandega rapideco, sed la plej rapida (po 10 mejloj en ĉiu sekundo) atingos la teron nur post 158,100 jaroj. La plej rapida stelo moviĝas trans la ĉielo po 138 mejloj en ĉiu sekundo (250-oble pli rapida ol kuglo) sed ĝi estas tiel malproksima, ke se la luno starus senmove en la ĉielo, tiu stelo pasus malantaŭ la luno nur post 200 jaroj.

Per la okuloj oni povas vidi 6,000 stelojn, sed per la grandega teleskopo, 100,000,000 pli malproksimajn stelojn. Oni opinias ke oni povas vidi per la teleskopo stelojn pli ol 3,500 lumjarojn malproksimajn. Sendube ekzistas steloj pli malproksimaj, ĉar spaco ne havas limon. Oni povas diri laŭ la Reĝo Davido, "La ĉieloj rakontas la glorion de Dio, kaj la farojn de Liaj manoj raportas la ĉielo firmajo."

Jos. H. NOBLE.

Elizabeto kaj la patrino mangis. La patrino diris:

"Tiujn ĉi sardinojn, Elizabeto, la pli grandaj fiŝoj multe mangas."

"Sed, patrino, kiel la fiŝoj povas malfermi la stanajn ujojn?"

El la angla tradukis J. H. HEALD.

La Leciono De Haroldo

DE ARLO BATES, LITT. D.

GESTAS bela julia mateno. Sur la verando de marborda dometo sidas Sinjorino Marmaduke kun sia sesjara fileto Haroldo. La marondetoj dancas kaj briletas, kaj kelkaj jahtoj glitas tien kaj tien ĉi trans la blua supraĵo de la golfeto. Sinjorino Marmaduke havas mienon tre decidan, kaj en sia mano estas simpla legolibro. Haroldo sidas flanke de ŝi sur malalta seĝo, kaj sur la vizaĝo li montras tian serenan aspekton, kia apartenas sole al infano antaŭ kies piedoj kuſas la mondo, ĉar al li ekzistas nenia mondo, kiun li ne povas venki.

“Vi scias,” diris Sinjorino Marmaduke per tonoj dolĉesonaj, kiuj tuj sciigis al la fileto ke ŝi volas peti de li ion malagrablan, “vi scias, ke vi devos legi kun mi matene dum la somero, se vi volos atingi vian klason, ĉar vi tiel multe da tempo forrestis en la vintro, kiam vi estis malsana. Mi volonte donos mian tempon por vin helpi, kaj—.”

“Ho, ne estas necese, Panjo,” interrompis Haroldo, kun granda abnegacio, “Mi ne deziras tro okupi vian tempon.”

“Sed vi ne volos eniri la etulan klason, ĉu jes?”

“Ne, Panjo, sed mi povos iel sukcesi. Mi estas troaĝa por lerni denove kun la etuloj.”

“Via aĝo ne rilatas al tio, Haroldo. Tio dependas de kiom vi scias.”

Tiu aspekto ŝajnas fari impreson je la knabeto; unu momenton li silentas, kaj la patrino supozas ke li primeditas la aferon. Sed subite li eksplodeme demandas:

“Panjo, kiel oni ne havas ĉiumonate ‘Kvaran de julio’ (*usonan nacian festtagon*)?”

“Mi klarigos al vi ĉion pri tio alian fojon, karulo. Nun, vi scias, vi lernos lecionon.”

Si malfermas la libron kun mieno tiel severe decida, ke la knabo timetas; Tamen li ankoraŭ ne estas venkita.

“Sed, Panjo, mi volus scii pri ĝi!”

“Alifoje, Haroldo, nun mi deziras ke vi legu.”

Haraldo profunde ĝemetas, kaj rigardas la libron kvazaŭ ĝi estus strangajo, kies utilecon li tute ne povas diveni.

“Mi kredas ke vi jam legis la unuan parton de ĉi tio, antaŭ ol vi forlasis la lernejon, Haroldo; tamen, tute egale, ni komencos ĉe la komenco. Jen estas fabelo pri Ĉoto kaj Beto. Ĉoto estas la hundo, kaj Beto estas la bovino.”

“Ho, Panjo, Edējo Frost intencas nomi sian hundon ‘Frostfišo’! Ĉu vi ne opinias ke tiu estas ridinda nomo?”

“Jes, mia karulo; sed nun ni atentos ĉi tion. Literumu la unuan vorton.”

“B-a,—Ho, panjo, rigardu la komikan boaton tie ekstere. Ĝi preskaŭ estas sama ĉe ĉiu ekstremajo.

“Se vi rigardos la boatojn, Haroldo kara, ni devos eniri en la domon por la leciono. Mi opinias ke estas pli agradable ekstere, ĉu vi ne?”

“Sed, panjo, mi ne povas ne vidi.”

“Se vi rigardos la libron, vi ne vidos tion, kio estas ekstere ĉe la haveno.”

“Ho ve! Mi dezirus ke neniu iam eltravis ke estas tia afero kia legado.”

“Tiaokaze estus neniaj feorakontoj verkitaj por ke mi legu al vi.”

“Do vi povus ilin elpensi, kaj tio estus egale bona.”

“Sed ne ĉiuj tion opinias, Haroldo. Kion povus fari aliaj homoj?”

“Ho, mi estus indiferenta pri ili,” diris Haroldo, kun la kruele sincera egoismo de infano. “Iaokaze, mi ne deziras legi.”

“Tial ne malsparu tempon malĝojante pri ĝi, sed tuj legu, kaj finu! Tio estas la plej simpla agmaniero.”

“B-a-ŭ. Kio estas tio, panjo?”

“Mi diros al vi la du unuajn vortojn, ĉar ili ne estas vortoj kiujn ni ofte trovias. Tio estas ‘baŭ-aŭ’! Nun daŭrigu, kaj legu la ceteron.”

“C-u,—ĉ-u,—”

“Faru la sonojn de la literoj, kaj vi tiel povos sciigi, kio estas la vorto.”

“Aĉĉ, aĉĉ,—”

“Ne ‘aĉĉ,’ karulo, sed ‘ĉĉ’!”

“Aĉĉ,—”

“Cĉ-u—”

“Aĉĉ, ĉuu,—”

“Ne, mia kara,” diras Sinjorino Mar-

maduke, kun ĝemsapiro ŝajne elpremita el la animo mem. "La vorto estas 'ĉu'; ĉe-ĉu, ĉu."

Haroldo rigardas la vorton kun naiva kaj tute nepersona scivolemo.

"Ĉu vi supozas, ke post unu semajno mi povos legi tiel bone kiel vi, panjo?"

"Apenaŭ post unu semajno, mi opinias, je via nuna grado de progressado," respondis la patrino ridetante.

"Kion tio signifas, panjo?"

"Kion signifas kio?"

"Tio, kion vi diris: 'nuda grano'—"

"Nuna grado de progresado signifas la gradon je kiu oni progresas. Gi signifas ke, se vi ne lernos pli rapide ol vi nun lernas, vi ne povos legi ĝis post longa, longa tempo."

"Nu, mi, nun lernos tre rapide. Ĉ-u,— Coto—"

"Ĉ-u,—ĉu,—"

"Ho, jes; Ĉu v-v-i, v-i,—"

"V-i,—vi."

"Vi."

"'Ĉu vi'—nu, antaŭen."

"V-i-d, v-i-d-a-s,—"

"Sonigu la literojn."

"Vvvviii—"

"Nu, aldonu la aliajn."

"Uddd, aa, sss,—"

"Kion tio signifas?"

"Vvviidddaaasss,—"

"Nu?"

"Ho, panjo, ĉu mi ne povas nun ĉesi? Nia instruistino ĉiam permesas ke ni ĉesu kiam ni estas lacaj."

"Sed, Haroldo, vi legis nur unu vorton, kaj tiun mi sciigis al vi! Se vi havos intertempon post ĉiu vorto, kiel baldaŭ vi opinias ke ni finos la libron?"

"Sed mi estas tiel laca ke mi ne povas pensi. Krome, mi terure deziras trinki."

"Se mi permesos ke vi iru por trinki, ĉu vi tuj revenos?"

"Jes, panjo. Kaj ĉu mi ankaŭ povos havi pecon da zingibra kuko?"

"Ho, Haroldo, ne estas duonhoro de kiam ni forlasis la manĝotablon!"

"Sed mi estas terure malsata, panjo!"

Sinjorino Marmaduke profunde ekĝemetas, sed ŝi senprudente konsentas pri la kuko, kaj Haroldo forrapidas kun viveco kiu videble kontrastas lian antaŭan malvigecon.

La patrino elrigardas la sunbrilan golfeton, kaj penas kalkuli la tempon kaj

laboron necesan por kapabligi la fileton legi ĉiujn vortojn en la libro, se tuta mateno estas necesa por instrui al li unu solan. Kelke da tempo ŝi sidas, kaj reve meditas pri la demando; kia estas la taŭga metodo por infana edukado, kaj por surmeti sur tiu sovaĝa karaktero la tute arbitran disciplinon de civilizacio. Tiel profunda estas la demando, ke ŝi tute ne povas atingi solvon, kaj ŝi tiom plene sin perdas en revado, ke ŝi ne atentas pri la pasanta tempo, ĝis kiam dekkvin minutoj jam foriris. Tiam ŝi sin demandas, kie estas la fileto; kaj, post dek pluaj minutoj, ŝi decidas ke estos saĝe lin serĉi.

Jus kiam ŝi levigas por la serĉado, jen li venas kurante ĉirkaŭ la domo post la hundo, kiu en la bušo portas bastoneton, al kiu estas alligita banderolo el ruĝa ŝtofo.

"Ho, panjo," ekkrias li, plene ignarante la tutan demandon pri lecionoj kaj ĉian antaŭan malsimplajon de la edukado, "Vidu Fidon kurantan kun la standardo!"

"Haroldo!" diras la patrino, per tono tiom severa, ke li subite haltas. "Ĉu vi opinias ke mi povos ree permesi ke vi iru por trinki kaj manĝeti, se tia estas via agmaniero kiam oni al vi fidas?"

"Sed, panjo, mi ja estis venanta tie! rapide kiel mi povis kuri."

"Kion pri Fido?"

"Gi nur kuris antaŭ mi."

"Ĉu plena duonhoro estis necesa, por ke vi trinku?"

"Vi permesis ke mi havu pecon da kuko, kaj vi ĉiam admonis ke mi manĝu malrapida."

"Diru 'malrapide,' Haroldo, ne 'malrapida.'"

"Manĝu malrapide."

"Sed vi ne bezonis duonhoron por manĝi peceton da kuko."

"Sed—"

"Ni ne plu atentu ĝin," diras Sinjorino Marmaduke ekĝemetante, "Ni devos daŭrigi la lecionon antaŭ ol la tuta mateno perdiĝos. Mi devos skribi leterojn por la meztaga poŝto, kaj mi ne havos sufiĉan tempon se ni ne rapidos."

"Sed, panjo, kial vi ne unue skribos viajn leterojn, kaj mi legos poste?"

"Haroldo, ĉesu paroli kaj demandi, kaj legu. La unua vorto estas 'Baŭ-aŭ';

kaj, post tio, vi legis 'cu!' Nun antaŭen."

"Mi legis du vortojn, panjo, sed mi forgesas kio estas la dua."

"Cu vi, do."

"Cu vi," legas Haroldo, memfideme, "v-i-d-a-s—"

"Vidas."

"Vidas m-i-n. Kion 'm-i-n' signifas, panjo?"

"Sonigu la literojn, Haroldo."

"Nnn—"

"Ne 'nnn,' sed 'mmm.'"

"Mmm-m-i, mmm-iii-nnn—"

"Nu, kion faras tio?"

"Vin."

"Cu 'vin' komenciĝas per 'mmm'?"

"Ho, estas 'nin.'"

"Ne, ne, Haroldo; 'mmm-ii-nn, nin.'"

"Min. Cu vi povas vidi min."

"Ne 'cu vi povas vidi min?'"

"Cu vi vidas min? Panjo, cu vi povas vidi iun tra vitrajo mejldika?"

"Ne demandu nun tiajn demandojn, Haroldo. Atentu la lecionon. Daŭrigu per la vorto sekanta."

"Sed, panjo, nur respondu al mi pri tio sola demando, kaj mi ne faros alian. Cu oni povas vidi iun tra vitrajo, se ĝi estas mejldika?"

"Ne, kompreneble ne."

"Ne se la vitrajo estus tute klara?"

"Ho, mi ne scias kiel dikas devus esti vitrajo por ke, oni ne ĝin travidu."

"Oni neniel povus vidi homon malproksime unu mejlon, cu jes?"

Terure malespera severeco sin montras sur la vizaĝo de Sinjorino Marmaduke.

"Haraldo," ŝi diras decideme, "se vi ne atentos vian lecionon, mi ne permesos, la tutan tagon, ke vi eliru por ludi. Dum ĉi tiu tempo, vi devus jam legi la tutan paĝon, kaj vi ankoraŭ ne finis la unuan linion!"

"Ho, cu mi devos legi la tutan paĝon, panjo? Mi ne volas legi tiel multe."

"Sajnas, Haroldo," la patrino respondas, penante lin timigeti, "sajnas kvazaŭ oni devos vin enlitigi antaŭ ol vi finos alian linion."

"Ho, mi ne volos enlitigi. Mi legos; ja, vere, mi legos, se vi ne min enlitigos."

"Do, daŭrigu kaj legu."

"Cu vi vidas min? Mi—' Cu mi ne tio legis bone, panjo?"

"Tre bone. Daŭrigu."

"E-s-t-a-s, estis."

"Estas."

"Mi estas estas—"

"Ne, ne. Ne 'estis estas,' sed 'mi estas.'"

"Mi estas la—' Tiun vorton mi sciis. 'Mi estas la—' Ho, panjo, tio vorto estas tro longa por legi. Nur diru al mi tiun vorton."

"Tiu vorto estas 'malgranda.'"

"Mi estas la malgranda h-u-n-d—"

"Kio estas la fina litero?"

"C."

"Ne, ĝi estas 'o.'"

"C, H-u-n-d-o, bovino."

"Kion? Haroldo, vi scias kio estas tio! Kial vi diras 'bovino?'"

"Nu, estas bovino en la bildo."

"Estas ankaŭ io alia."

"Ho, estas viro."

"H-u-n-d-o' ne signifas 'viro'; kio alia estas en la bildo?"

"Ho, mi scias; ĝi estas 'hundo.' Mi estas la malgranda hundo.' Cu mi ne tio legis?"

"Tre bone; sed tio ne estas la fino de la frazo. Kio estas la alia vorto?"

"Tio estas longa vorto, panjo, kaj, se vi havas leterojn por skribi, bonvole sciigu min nur ĉi tiun fojon, por ke ni povu fini."

"Tio estas la nomo de la hundo, 'Coto'."

"Robčjo Davis havas hundon, kaj ĝia nomo estas 'Bukla.' Cu tio ne estas ridinda nomo, panjo?"

"Kiel tio koncernas la lecionon, Haroldo?"

"Iaokaze, mi opinias ke mi rajtos nun havi intertempo."

"Kial vi devus havi intertempo, kiam vi ĵus revenis post duonhora foresto?"

"Ciaokaze, nun estas libertempo, kaj neniu havas lecionojn dum libertempo."

"Sed vi dum ses monatoj ne havis lecionojn."

"Nu, mi estis malsana. Cu vi ne opinias ke mi tiam estis bona, kiam mi estis malsana?"

"Jes, plejmulte de la tempo vi bone kondutis."

"Kiam Tomčjo Trask estis malsana, li estis tiel malafabla ke oni apenaŭ povis alproksimiĝi al li. Lia flegistino diris al Hanno ke ŝi timis ke ŝi devos trovi novan situacion, tiel malbona Tomčjo estis."

"Hanno ne devus permesi ke vi aŭdu tiajn aferojn."

"Nu, ĉu ŝi povas malhelpi? Ĉu ŝi scias kion ŝi diros, ĝis post kiam ŝi ĝin jam diris? Si ja ne povas ŝtopi miajn orelojn! Mi diras al vi, mi ja iom kontraŭstarus, se ŝi penus tion fari!"

Batanta horloĝo avertas Sinjorinon Marmaduke ke, se letero devos esti skribitaj por la tagmeza poŝto, ŝi devos tuj atenti ilin. Si fermas la legolibron, penante aspekti severa, sed nur sukcesante ŝajni ĉagrenita,—kiu aspekto tute ne ĝenas Haroldon.

"Haroldo," ŝi diras, "mi devas nun iri por skribi la leterojn, sed morgaŭ mi povos permusi nenion similan al ĉi tio. Vi devos morgaŭ fari pli bonan lecionon, kaj mi devos deteni vin de ludado, se vi ne bone legos."

"Panjo, mi ja malamas la legadon, kaj mi volas neniam ĝin scii."

"Sed, supozu ke vi estus sur dezerta insulo, havante nenion manĝeblan; kaj supozu ke estus elpendajo montranta kie kuſas nutraĵo kaſita; kaj vi ne povis ĝin legi. Tiam vi mortus pro malsato, ĉar vi ne estus lerninta legi."

"Kio estas nutraĵo?"

"Ajo por manĝi."

"Sed ne estus elpendajo sur dezerta insulo."

"Povus esti. Homoj povus antaŭe esti tie, kaj ĝin postlasi."

"Kial oni nomas la insulon de 'Swiss Family Robinson' (*rakonto multe amata de knaboj*) dezerta insulo? Ne ekzistas tie sablo; tamen dezerto estas loko kie troviĝas sablo, kaj kie nenio kreskas krom palmoj kaj sablo kaj arboj kaj kamoloj."

"Oni nomas insulon dezerta, se neniu homo logas tie."

"Sed tio ne estas prava."

"Jes, ĝi estas prava, se oni tiamaniere uzas la vorton."

"Ne, tio ne estas prava."

Sinjorino Marmaduke ekĝemetas kun mieno de tiu, kiu forlasas diskuton neutilan, kaj leviĝas. Enirante en la domon, ŝi turniĝas por diri.

"Memoru, ke morgaŭ ni efektive legos."

"Jes, Panjo; ĉu mi ne bone legis hodiaŭ?"

Al tiu demando ŝi ne respondas, sed iras al sia skribtableo por skribi al la edzo (kiu ankoraŭ estas en la urbo), por demandi ĉu li ne povos trovi guverniston, kaj ŝin kunkonduki kiam li venos.

El la angla tradukis, kun permeso de la aŭtoro kaj de la eldonisto.

HERBERT HARRIS.

LA RESPONDO

Du moneroj kuſis kune en monujo. Krom ili neniu monero estis tie. Unu estis arĝenta, granda, blanka kaj hela, ĝi estis dolaro. La alia estis kupra cendo, malgranda, brunruĝa, malhela kaj malpura. La dolaro ekĝemesis kaj diris: "Ho ve! ho ve! kia abomeninda sorto, ke mi estas devigata resti sen kunulo!"

"Kio okazas, Sinjoro?" diris la cendo, "Ĉu mi ne estas tie ĉi?"

"Vi!" arogante ekkriis la dolaro, "Kaj kia kunulo estas vi por mi? Pli bone estus se mi estus tute sola."

"Sed mi ankaŭ estas monero."

Ho! kia monero! vi estas bagatelo, mi valoras centon da vi."

"Vere, sed se oni ne konservus min oni ne gajnus vin; ni estas fabrikitaj en la sama fabrikejo, de la sama registro, kaj ni ambaŭ portas sur la vizaĝo la signon de tiu lando. Sajnas al mi ke vi tro fieras."

"Mi rajtas fieri; oni faris min el arĝento, la sama metalo el kiu oni faras ornamajojn por la virinoj, kaj ili portas miajn parencojn en la haroj kaj ĉirkaŭ siaj belegaj koloj kaj brakoj; sed vi estas farita el kupro, la metalo el kiu oni fabrikas la malsuprojn de potoj por la kuirejo. Mi troviĝas en la poſoj de plenaĝaj riĉuloj kaj mi havas gravan lokon en la aferoj de la mondo; sed vi troviĝas kun almozuloj kaj infanoj. Oni bonvenas min en palacoj kaj la domegoj de la riĉuloj."

La cendo ekĝemesis kaj pripensis, sed subite ĝia vizaĝo heligis kaj ĝi diris: "Jes, sed mi estas pli pia ol vi: mi ofte estis en la mon kolektujo de la Diservo, kaj mi ne rememoras ke iam ajn mi vidis vin tie."

El la angla tradukis

F. P. ZENT.

Simbolo De La Vivo.

LONGE antaŭ mia vizito al Hindujo mi aŭdis kaj miris pri la strangaj povo, kiujn laŭ diro la veraj magiistoj de tiu lando posedas. Duone mi kredis al ili; duone mi mokridis; sed mi decidis ke se iam mi iros al tiu mirlando mi esploros pri tiaj misteraj aferoj.

Tial, kiam mi fine trovis min en la hindia lando, mi penis trovi tian mirpovan personon, kiu povos pruvi al mi ke la magio vere ekzistas. Dum unu tuta somero mi serĉis en la plej civilizitaj partoj de Hindujo, kaj oni ofte kondukis min al viroj, kiuj pretendis ke ili posedas la sekreton de magio. Kelkaj el tiuj ĉi ja elfaris strangajn aferojn, sed mi povis vidi ke ili estas nur jonglistoj, kiuj trompas la publikon por mongajno. Vana ja estis mia serĉado, kaj mi fine devis forlasi ĝin. Mi ćesis, konvinkite ke la magio estas nur trompo, ke la neeblo estas ja neeblo.

Tamen, kiel Shakespeare diris, "Kiaj malsprituloj estas tiuj ĉi homoj." Ni tenas opiniojn je temoj, pri kiuj ni scias nenion. Ni akiras kredojn tute sen ia bazo, nur ĉar ni ne sufice esploris antaŭ ol fari konkludon. Ni mokas pri multaj aferoj, sole ĉar ni ne komprenas ilin. Estis ĉiam tiel; Sendube tiel ĉiam estos. Ĉiam? Ne, ni esperu ke iam la homoj vekiĝos, ke iom ni perfektigos. Ĉu ni efektive ne ĉiam progresadas? Jes, vere, tiun veron mi lernis ĉe la hindoj; niaj konkludoj pri iliaj kredo ĉiam baldaŭ ŝanĝotaj. Almenaŭ unu senbaza opinio mia estas renversita.

Dum la lasta vintro de mia ĉeesto en Hindujo mi trovis min en tre maldense loĝata, iom sovaĝa kaj malofte vizitata parto de norda Hindujo. Tie mi aŭdis neklarajn kaj konfuzitajn raportojn pri iu klerulo, kiu loĝas en la montoj. Mi tuj decidis viziti lin, pensante ke eble ĉe li mi trovos mian longe serĉitan magiiston. Mi dungis gvidiston, kiu kondukis min al tre sovaĝa monta regiono proksimume dek kvin kilometrojn de la vilaĝeto kie mi estis loĝanta. Dum la veturo mi remarkis kee la gvidanto videble ŝanceligis. Evidente la loĝantoj iom timis ĉi tiun

strangan klerulon. Fine ni alvenis al malnova ruiniĝinta hinda preĝejo, kaŝita en la monteto. Tiam mia gvidanto rifuzis iri antaŭen. Li diris al mi ke mi eniru la konstruaĵon kaj atendu tie. Lasinte min, li reiris laŭ la sama vojo, per kiu ni alvenis.

Mi konfesas ke mi estis iom timigita, enirante tiun antikvan hindan templon, sed mi kuraĝigis min kaj transpasis la pordegon. Cio interne estis silenta. Strangaj statuoj senmove rigardis min, eksterordinaraj objektoj, pratemppe uzitaj en adorado, kuŝis sur la tero, senutilaj. Aperis nenia signo de homa vivo, aŭdiĝis nenia sono. La loko ŝajnis tiel soleca tiel malgaja, ke mi komencis senti tre malkomforta, kaj demandis min ĉu la tuta afero ne estas ruzo por kapti kaj rabi min, kaj ĉu la gvidisto ne baldaŭ revenos, armite por min mortigi. Tiel mi estis pensanta, kiam subite mi aŭdis soneton, kaj jen, antaŭ mi, marŝanta al mi, estis la magiisto mem!

Momente mi ektimis, tiam mi regajnis kuraĝon kaj observis la viiron. Li estas tre maljuna; lia bruna vizaĝo estis plena je sulketoj, sed li staris rekte kaj lia forto ŝajne estis perfekta,—sendube konserve per la stranga sistemo de sanguado, kiun praktikas tiaj homoj. Li estis simple kaj blanke vestita. Lia nigra hararo falis bele malsupren sur la ŝultroj. Liaj okuloj, hele brilante, min akregadis. Fine post mallonga silento li parolis, per dolĉa aminda voĉo:

"Mia frato, mi ĝojas, bonvenante vin al mia simpla loĝejo. Mi jam scias la kialon de via vizito. Vi deziras vidi pruvon de mia sperto. Vi ne estas la unua, kiu tien ĉi venis serĉante tion. Sed sciigui, frato, ke la sekretoj, kiujn mi tenadas, ne estas por ĉies oreloj. Nur tiuj homoj, kiuj sincere serĉas kaj sekvas la veran vojon povas partopreni ilin kun mi. Se vi estas sincera blindulo serĉanta la veron, sekvu min. Se vi estas nur scivolemulo, mokanta tion, kion vi ne komprenas, mi konsilas vin ke vi foriru."

Li turniĝis, kaj kompreneble mi sekvis lin, al malgranda ĉambreto en la muro de la konstruaĵo. Lia pacema maniero

ĉarmis min, kaj efektive mi jam sentis plej profundan intereson, plej humilan deziron sciigi, kvankam unue mi estis alveninta precipe pro scivolemo. En tiu ĉambreto estis preskaŭ nenio: simpla lito el folioj, malglata tablo, du ordinaraĵ benketoj, kelkaj kuiriloj el argilo, multaj surskribitaj rulajoj ŝajne treege antikvaj.

idante ke mi multe rigardis la rulajojn, li diris:

“Tiuj estas multvaloraj super ĉia prezo. Ili enhavas la saĝon de multaj homoj, kaj rakontas la plej profundajn sekretojn de la naturo. Se vi scius ilian enhavon, vi posedus grandan povon, kian vi nun ne povas eĉ imagi. Sed tiuj skribajoj ne estas por viaj okuloj. Ekzistas ja multaj sekretoj, kiujn homaro ne povas sci, ĉar homaro ankoraŭ ne estas preta, ankoraŭ ne povas kompreni kaj prave uzi ilin. Iam poste vi ekscios ilin, sed ne nun. Ĝis tiu tempo, kiam la homoj forlasos sian senfinan malamikecon, sian sangan militadon, sian frenezan penadon havigi la materialan riĉajon de nia mondo, ĝis kiam oni komprenos ke la vera feliĉo ne estas tiamaniere trovebla, ĝis kiam oni celos pli altan lumon, preta per sekvi la veran vojon,—ĝis tiam oni ne povos koni tiujn sekretojn. Frato, juĝu vi mem. Ĉu vi estas preta ricevi ilin?”

Mi devis konfesi ke ne, kaj la saĝulo respondis:

“Frato, mi ĝojas ke vi ĝin konfesas. Tio montras ke vi estas almenaŭ sur la vojo, eĉ kvankam vi mem ne tion scias. Mi scias ke scivolemo altiris vin ĉi tien, tamen mi kredas ke vi profunde deziras lerni la veron. Mi opinias ke vi ja sentas sinceran deziron pli perfektigi vin, kaj konatiĝi kun la eterna vero. Tial mi duone satigos vian deziron. Mi donos al vi iom da *lumo sur la vojo*. Atentu ĝin, pensadu pri ĝi, penadu sekvi ĝin; kaj la reala sukceso fine venos al vi. Frato, mi diras adiaŭ.

“Paco estu al vi!”

Subite mi sentis fortan ekfrapon. La hindu tute malaperis, la ĉambreto malrapide neniiĝis antaŭ miaj mirigitaj okuloj. Ne povante paroli, mi rigardis la strangan vidajon. Tiam malheia verda fajro eksaltis el la tero ĉirkaŭ mi. Murego el fajreroj enfermis min, danante, brilante, kirlante, kaj samtempe

aperis misteraj vizajoj. Tiuj teruraj formoj estis malbelegaj, ili timigis min, sed mi ne povis forkuri de ili; mi estis kvazaŭe ligita al ili; kaj malklare mi sentis ke ili estas parto de la homaro, ke ili estas parto de mi mem. Ili malbelaj vizajoj ridetaĉas al mi, kaj des pli naŭze ili sentigis al mi la teruran fakton ke ili estas mi mem.

Jen la vidajo ŝanĝigis. La koloro de la fajro fariĝis malpure flava, la malbelaj formoj fariĝis malgrandaj vermsimilaj estajoj, kun grandaj severaj vizajoj. Granda amaso el ili, ŝajne blindaj, rampantaj, sin tordantaj bestoj, penis grimpi unu sur alian ĝis la supro de la amaso. Multaj estis subpremataj kaj mortigataj, ŝajne kun terura sufero. Freneze ili batalis, dum aliaj sukcesis grimpi supren, por nur fali ree ĝis la tero, kaj tie morti. Sub la amaso kuŝis granda amaso da kadavroj. Sed miloj da aliaj estajoj alvenis kaj eniris la amason por preni la lokojn de la mortintoj. Malindaj vermoj! Ciu baraktis por si mem, kelkfoje iuj batalas kune, sed preskaŭ ĉiu batalis por si mem kontraŭ ĉiu alia,—kaj ĉiam perdante la batalon. Malagrabla bildo! Denove la vidajo ŝanĝigis. La fajra cirklo ĉirkaŭ mi pligrandigis, ĝis kiam mi apenaŭ povis vidi ĝiajn limojn. La flava koloro fariĝis vasta pure blindanta blanka lumo. Gi estis hela, alloga, ĝoiga vidajo, tamen tiel malproksima ke mi ricevis nuran sugestion de ĝia reala belegeo. La vermsimilajn estajojn anstataŭis sennombraj helbrilaj oraj punktoj en la blanka lumo. En ĝia varma lumo mi sentis dolĉan ciopovan pacon. Mi deziris resti eterne tie,—ĝi estis tiel harmonia, tiel pura. Tamen malrapide ĝi malheliĝis antaŭ mia rigardo, malproksimiĝante ĝis kiam mi ne plu povis ĝin vidi.

Subite la hindu klerulo staris apud mi. Kun levita brako li montris al la loko, kie estis malaperanta la pura lumo.

“Cu ĝi estas bela, frato?” li demandis.

“Ho, treege bela,” mi sopire respondis.

“Ho, mia frato, vi do sekvu ĝin. Gi estos via, se vi volos.”

Momente ni ambaŭ silentis, tiam mi iom timeme demandis: “Saĝulo, diru al mi, kion signifas la mistera verda fajro, kun ĝiaj malbelaj vizajoj?”

“Gi estas la homo pasinta. Vi estas

nun super li, tamen li ankoraŭ vivas en vi."

"Kaj kio estas la flava fajro, kun ĝiaj kompatindaj estajoj baraktantaj?"

"Tio, frato, estas la nuna homa socio. Vi estas nun parto da ĝi."

"Kaj kion signifas la pura, blanka lumo?"

"La estonta homo, vivanta en eterna paco. Frato, vi kaj la cetera homaro, vi serĉu ĝin, sekvu ĝin, posedu ĝin! Gia paco estu via?"

Kun tiuj vortoj la klerulo malaperis, kaj mi neniam ree lin vidis.

RAYMOND T. BYE.

El Notlibro

Sen cel' vaginte dum tuta tago,
Dum longa tago de varma somer',
Kun vi mi sidis sur bordo de lago,—
Jam vesperiĝis. Silentis ter'.
Nur arboj bruis kaj bru' ilia
Mistera ŝajnis belkant' al kor'.
Mi vin rigardis: vizaĝo via
Malĝoja estis en tiu hor'.

Malĝojon vian mi ne komprenis,
Ne sciis kio elvokis ĝin.
Mi ne eksciis, mi ne divenis,
Mi nur senvorte rigardis vin.
Vi ĉiam estis por mi mistero,
Mistero estis kaj estos vi. . . .
Jam vesperiĝis. Silentis tero,—
Reĝino, tiam vin amis mi!

GEORGO DEŠKIN,
Vilno, Rusujo.

La Morto De Ermito

DE JAMES A. WOOLF

HA nomo de Robert Maul estas familiara al ĉiu en la urbeto B—. Dum multaj jaroj li loĝadis inter ni, uzante por loĝejo ruiniĝantan konstruaĵon je la angulo de Market kaj Liberty Stratoj. Ni sciis nur malmulte pri lia persona historio, krom la fakto de lia supozita parenceco kun malnova kaj altranga familio en Germanujo. Tiu sciado, tamen, estis pli spekulativa ol reala, ĉar Robert Maul estis sekretema viro, kiu nur malofte parolis kun siaj samurbanoj. Liaj bezonoj estis verŝajne malmultaj, kaj al ĉiu li ŝajnis kiel persono kies vivado estas ĉirkaŭita per mal-lumigaj ombroj. Li loĝadis sola en la loko kiun li nomis hejmo, kuirante kaj manĝante siajn ŝparemajn manĝojn same kiel kelkaj ermitoj de arbaro aŭ monto, kaj neniu sciis liajn kutimojn, nur ke li vivadis kaj movadis. Estis sensutile demandi lin pri lia vivo kaj celo,— li ne respondis.

Kaj tial multe da mistero aliĝis al la karaktero de Robert Maul. Tiuj, kiuj klopojis sciigi pri liaj aferoj estas repuſitaj, kaj la sekreton de sia pasinta

vivo li senĉese gardis. Oni sciis, tamen, ke li estis inteligenta kaj klera viro. Tiom da sia karaktero li montris per sia iometa interkomunikigo kun la homoj de nia urbeto. Tia interkomunikigo, tamen, okazis sole kiam li eliris por provizi siajn simplajn bezonojn. La fakto ke li estis klerulo nur aldonis brulajon al la flamoj de sciemo kaj donis frešan fervorecon al la konjektoj pri li. Lia malfableco ne estis harmonia kun la pruvetoj kiujn li donis de korteganaj manieroj kaj ĝentila lernado.

Pro kio tia viro sin vestis je kostumo de kamparano, kaj loĝadis sola en mizera kabano, neniu sciis. Li estis vere viro mistera,—la sekreto de lia malĝojo estis nepenetrebla al la palpo de fantazio, kaj lia individueco restis vualita.

Tiamaniere la jaroj preterpasis kaj Robert Maul daŭrigis sian vojon, silenteme, sekreteme kaj penseme. Sed tempo alvenis kiam la mistero de lia vivado malkovriĝis antaŭ kortego pli alta ol la juĝa tribunalo de homoj.

Unu ventegan vintran nokton, kiam oni estis kantanta laŭdojn al Dio en la preĝejoj de la urbeto, la krio "Fajro"

subite audiĝis. Per la brilego ĉe la fino de Market Strato la loko de la fajro facile troviĝis,—ĝi estis la konstruaĵo en kiu loĝadis Robert Maul.

Dum la malhelaj kolonoj de fumo supreniris kaj langoj el flamo lejis la lignon, venis en la korojn de la ekscitata vidantaro nenomebla timo. Kie estis la ermito? Dum nokto li neniam aperis sur la stratoj, kaj sendube li estis en lito. Sed neniuj aŭdis de interne de la brulanta konstruaĵo sonon, alvokon por helpo, kriagon de tormentego aŭ gemon de morto. Ŝajnis ke la flamoj prenis lin por sia kaptajo. Homoj ektremis kiam ili pensis pri la terura morto de Maul.

La alveno de la blanka ĉevalo kun sia rajdanto, la Morto, mallumigas la roz-kolorajn nuancojn de la vivo. Ni scias ke malvarmaj manoj premos niajn korojn, sed amantaj amikoj glatigas niajn kapkuseojn kaj iliaj larmoj enmiksiĝas kun la malsekajo de morto sur niaj fruntoj. Karaj amikoj alportos nin

al niaj tomboj, kaj niaj korpoj dormos dum la jaroj sub la aroma de herbajo kaj floro.

Estas malĝoje morti tiamaniere,—sed ni malĝoje detiris nin de teruro pri la mortalvoko al tiu bedaŭrinda ermito. Koroj, kiuj sentis nenian kompaton aŭ simpation por la maljunulo, kaj estis preskaŭ indiferentaj pri lia malĝojo kaj soleco, fariĝis kompatemaj kun bonsento.

Post nemultaj horoj oni eksciis la veron. Homoj esploris la ruinojn kaj trovis la karbetigitan kaj nigritan kadavron de Maul inter la cindroj, ĝuste sub la loko kie li dormadis.

Sen ceremonio la estraro de la urbeto lin entombigis, ĉar li ne posedis monon por glatigi sian vojon al la tombo, kaj ne aŭdigis ia funebra kanto aŭ la plorado de amikoj. Tiamaniere mortis la ermito de B—.

*El la angla tradukis, laŭ
permeso de la aŭtoro,
ROBERT S. WOOLF.*

La Libroj Kiuj Neniam Venis

Li estis tiel junaj kaj ŝajnis tiel naivaj ke mi invitis lin enveni. Kiam ni estis sidiĝintaj, li diris, "Mi volas unue diri ke mi ne estas libragento," kaj tuj el prenis grandan prospekton el la poŝo de sia vesto por atesti sian diradon.

"Nun, Sro. H," li diris, "Mi ne vendas librojn, sed mi ĉeestas en la urbo por anonci la librojn kiujn aliaj viroj baldaŭ venos por vendi. Mi intencas doni kelke da kolektoj de ĉi tiuj libroj al eminentaj sinjoroj en ĉi tiu urbo, petante nur leterojn rekomendantajn la librojn, por la uzo de la libragentoj, kiuj sekvos min."

"Cu mi komprenas," mi diris, "ke vi donos la librojn al mi tute senpage?"

"Jes, sed kiam mi donas la librojn ili ne estas binditaj. Nun, vi povas bindigi ilin ĉi tie, se vi volas, sed ni povas bindi ilin pli bone kaj pli malkare."

"Kiom vi postulas por bindi ilin?"

"Per drapo, dekdu dolarojn kaj duonon. Per ledo, dudek sep dolarojn kaj sepdek kvin cendojn."

"Nu, mi prenos la librojn kaj bindigos ilin ĉi tie."

"Mi forgesis diri ke ili ne estas falditaj."

"Estas bone. Mi povas faldi ilin."

"Cu vi povas faldi librojn?"

"Jes."

"Nu, se vi insistas, ni sendos la librojn, sed mi ankoraŭ opinias ke ni povas bindi la librojn pli bone kaj pli malkare ol la bindistoj ĉi tie."

"Mi riskos ĝin, kaj, flanke, kiam venos la libroj?"

"Eble post monato."

Monato pasis. Ses monatoj pasis. Mi atendas de ses jaroj, kaj mi ankoraŭ ne estas ricevinta la librojn.

WILLIAM H. HUSE.

"Jen estas aŭtomobilo tia, kian vi bezonas. Vi ne devos rampi sub ĝin por ripari ĝin."

"Cu ne?"

"Se iu mašinero malbone funkciias, la aŭtomobilo tuj renversiĝos!"

El la angla tradukis J. H. HEALD.

La Du Vojoj

KOMO alvenis en sia vivo tien, kie du vojoj ekaperis antaŭ li. Ni ankaŭ jam staris ĉe tiu sama vojkruco, legis la montrilojn, kiuj nomas ilin klare, kaj rigardadis iliajn meritojn videblajn sed malsimilajn. Rezono kaj Fido ili estas nomitaj; kaj la okuloj de imago antaŭen portis la forton de tiu homo, por ke li vidu malproksimege, kaj ordonis ke li haltu por konsideri kaj decidi pri la invitajoj malsamaj.

La vojo Rezono estis larĝa kaj ne barita, tamen postulis nenian superhoman kapablecon. Oni povis esplori dekstre aŭ maldekstre, sen riproĉo pri natura dabo, aŭ pri koro dediĉita al la vero, saĝeco kaj klereco. Troviĝis en kelkaj lokoj montrōstonoj sur kiuj estis skribitaj la nomoj de famaj homoj kiuj jam studadis mondajn aferojn kaj per tiu laboro benigis la homaron,—Darwin, Huxley, Voltaire, Paine, Ingersoll, kaj aliaj. Ili ŝajnis kvazaŭ ŝtupoj kondukante al pli hela tempo, al pli klara kompreniĝo inter homoj, kaj forvišonte miljarojn da kredemeco, sorĉemado, kaj sangelfluo por kredoj neebaj sed longe daŭrantaj. Nenian kredon la vojo Rezono postulis, nenian fidelon al dogmaro heredita; sole ĝi serĉis la lumon kaj celis helpi al pli nobla homaro.

La vojo Fido estis plej malnova. Pro sia larĝa enirejo ĝi estis la vojo elektita de la popolamaso, sed laŭ la multe surmarŝita vojo ĝi mallarĝiĝis kaj rektiĝis antaŭ la okuloj de la vidanto. En kelkaj lokoj ĝi estis makulita, sed ĝi ne estis ornamita de la sango de homoj kiuj mor-

tis pro malkonsento aŭ pereis per fajro dum iliaj okuloj kaj fingroj montris la sanktan signon, krucon sur monteto. Kelkloke kuŝis aroj da ostoj, kiuj mute parolis pri turmento kaj rememorigis el historio nomojn famajn,—Cranmer, Ridley, Latimer, John Huss,—signojn de profunda fido, kiuj tamen lasis ĝian fundon tiel neklaran, kiel antaŭe. Sed super ĉio brilis benanta lumo, heligante la vojo por la marŝantoj. Laboristo, malriĉulo, malklerulo, ĉiuj portis konsente siajn ŝarĝojn; efektive ŝarĝojn tiajn, kiaj mortigus la bone vestitan pastaron, kiu gvidis la homojn. Ĉar el la bušoj de la pastraro eliris vortoj pri semorta animo, pri vivado eterna. Se iu ajn falus sub sia ŝarĝo, lin revivigus, simple tušo, aŭ ia kanto "Ci tre laciĝas, mi ankaŭ suferegas; restu fidela ĝis la morto kaj mi donos kronan vivan." Tiam la falinto, la dubinto, sin levis senvole, kaj post admono ricevis benon. Simbolajn manojn oni metis sur lin, instruante al li babiladi "Tiu, kiu kredos, vivos eterne," kaj la horo ree kantis adoradon dum li antaŭen marŝis. La vojo pli kaj pli mallarĝiĝis dum ĉiaj gentoj kune kantis pri ia Sankta Urbo ie,—ie!

Ankoraŭ la marŝantoj iradas, fidante, esperante, kredante, ĝis kiam aperas nokta mallumo. La du malsamaj vojoj kuniĝas, montrante je la fundo tombon; kaj la malsekaj okuloj vidas tion, kio terurigas homojn,—unu komunan tombejon, unu komunan celon por ĉiuj, nome, ripozadon en la profunda tero, kiu mem nutris ilin.

HENRY H. PRATLEY.

FREMDAJ LINGVOJ DE HENRY WARD BEECHER

Kiam mi estis en Germanujo, inter fremda popolo, aŭdante strangan lingvon, el kiu mi povis kompreni neniu vorton, vidante la aferojn kiuj okazis ĉirkaŭ mi, mi sentis kiom mi estas apartigata de homa vivo, kiel malproksime de ĝi mi staras, kaj kiel efektive la ondo de simpatio, en kies mezo mi staris,

ne estis por mi. Nek povis mi trudi min al ĝi, nek havigi ian enlogadon en ĝin. Se en tiu ĉi mondo homo ne povas paroli la lingvon de homoj, li staros ekstere de la homaro, spite ĉio, kion li povos fari.

El la angla tradukis
WYATT RUSHTON.

Patent Office Decision

LAST fall a firm manufacturing underwear and hosiery applied to the United States Patent Office for registration of the word "Saniga" (which is the Esperanto word for "sanitary") as a trade-mark. Under the rule of the Patent Office that no general descriptive word, or its equivalent in a foreign language, is registrable, the Examiner of Trade-Marks refused to register "saniga" as a trade-mark.

Through its lawyers the firm appealed from this decision to the Commissioner of Patents, contending that Esperanto is not a language, within the meaning of the law and of decisions thereon, and that "it is improper for the Office to refuse registration where such refusal *depends upon the recognition of Esperanto as a language.*"

The Commissioner, quoting various

authorities (notably *Nelson's Loose-Leaf Encyclopedia*), decided that the Patent Office was "justified in recognizing Esperanto as a language in a case of this kind," and the following decisions were upheld:

1. Trade-Marks—Foreign Language—"Esperanto."

Esperanto *Held* to be a language within the meaning of the ruling that the equivalent in a foreign language of a descriptive word is unregistrable.

2. Same—Same—"Saniga."

The word "Saniga," which is the Esperanto word for sanitary, *Held* unregistrable as a trade-mark for underwear and hosiery, since the word "sanitary" is descriptive of such goods.

The record of this case and the decision thereon are given on page 286, vol. 173, of the U. S. Patent Office publication, entitled "Official Gazette," and may be verified by any doubter.

To Zamenhof

A great world-hero's in our midst,
He speaks a tongue his own;
Conceived in days of dreamy youth,
Wrought out by him alone.

He moulded into living form
The whole world's dearest theme;
In making real its high ideal,—
The Peace all nations dream.

In all the world he's planting peace,
The people watch it grow,
Till war's defence is all forgot,
And nowhere lurks a foe.

A great world-hero's in our midst,
His fame resounds afar;
We proudly wear in praise of him
The Esperanto Star.

S. V. K.

ANECDOTO

Marſinte laŭ kampa vojo, mi aŭdis kriegojn de viro en malgranda domo. Mi kuris al la dometo kaj malferminte la pordon, mi vidis grandan nigrulinon kiu batis malgrandan nigran viron.

"Ne battu la kompatindan malgrandan viron!" mi diris.

"Mi rajtis bati lin," ŝi respondis, "Car li estas mia edzo."

"Sed kial vi batis lin?" mi demandis.

"Li estas malsagulo," ŝi respondis. "Li malfermis la pordeton de la kokinejo, kaj la kokinoj ĉiuj foriris. Tial mi batas lin." Kaj denove ŝi batis sian edzon.

"Ne estas grava afero," mi diris. "Se vi ne fermos la pordeton de la kokinejo, la kokinoj ĉiuj certe venos hejmen kiam la suno subiros."

"Venos hejmen, venos hejmen!" ŝi ekkriis, "ili jam de longe iris hejmen!"

*El la angla tradukis
JOSEPH H. NOBLE.*

Book Reviews

EHOJ EL MANILA, by Edgar A. McClellan. With portrait of the author. 99 pages. 75 cents.

The author disarms the critic in his preface which is an apology for and explanation of his early attempts at translation for publication. If he is a novice, as he modestly claims, his syntax and grammar are wonderfully free from error and he shows the foundation of a good style. The first half of the hundred pages in the book is taken up with a translation of an introductory explanation of the philosophy of Buddha and the more or less abstract matter is well handled in the translation. There is a rather free use of suffixes,—noticeably "ad," which occurs ten times in a page of 185 words. Aside from press errors there are several unfamiliar words.

The general somberness of the book is relieved by "Mia Amiko Jones," a bright little story dealing with "high finance" in the United States.

With his foundation for excellent work, Sro. McClellan has an opportunity to give us something more characteristic of the land in which he lives. There must be in the Philippines a wealth of material for future publication which would be more typical of that country and of peculiar interest to the Esperanto world.

ROZO SOVAGA AÜ PENTITA KULPO, by P. Kress. 23 pages. 10 cents.

This booklet contains a little romance, and two or three original or translated poems.

EL LA DOMO TIE KONTRAÜA, by Arnold Behrendt. Mimeographed typewriting. 13 pages. 10 cents.

A pathetic little sketch concerning a victim of tuberculosis.

ORGANIZADO DE LA INTELEKTA LABORO PER LA PONTO, by K. W. Buhrer and Ad. Saager. Translated by J. Schmidt. 157 pages. \$1.

A rather technical work, concerning the problem of general classification of knowledge and organization of intellectual endeavor,—the unionizing of brain workers, so to speak.

VERSAJOJ, by Georgo Deskin. With portrait of the author. 32 pages. 10 cents.

A collection of 22 poems, the first one being "Kavaliro" from the pages of the May, 1912, number of AMERIKA ESPERANTISTO. There is a good rhythmical quality about the majority of these poems, all of which are original.

ESPERANTO KAI ESPERANTISMOS, by Dr. Anakreon A. Stamatiaades. 93 pages. 25 cents.

This article in Modern Greek is a suitable book for that Greek friend,—or you might use it for general propaganda purposes, if neither you nor any of your friends can read its content; for at least the title is intelligible to all.

STOICHEIA TES DIETHNOUS GLOSSES ESPERANTO, by Dr. Anakreon Stamatiaades. 68 pages. 25 cents.

This text-book (elements of the international language Esperanto), with an Esperanto-Greek vocabulary, adds another to the list of worthy text-books on Esperanto. Persuade your Greek friend to invest in a copy and begin learning Esperanto forthwith.

DIETHNES BOETHETIKE GLOSSA EIS 30 MATHEMATA, by Dr. Anakreon Stamatiaades. 80 pages. 40 cents.

This is "Esperanto in 30 Lessons" with a small additional vocabulary, by the well-known propagandist Dr. Stamatiaades, with the approval of the Committee of the Principality on teaching in the schools of Samos. If you need a Greek text-book, try this one.

NORD-GERMANAJ RAKONTOJ, by Heinrich Bandlow, translated by E. Scheerpelz. No. 22 of the Esperanta Biblioteko Internacia. 45 pages. 10 cents.

This volume offers us five stories translated from the Low German dialect known as Plattdeutsch. This makes the fourteenth language represented in translation in this series. The selections are from the work of a well-known humorist, and will be read with the usual satisfaction that is received from the previous numbers of this *Biblioteko*.

EXTRACT FROM A LETTER.

"Our new class is very enthusiastic and, if they will only stick to it, I believe we will have the best class yet. One young man sprung a surprise on me last night. I was explaining some grammatical points to him and he began to converse in Esperanto. This was truly marvelous because we were on our second lesson and I had no idea he could speak a word of Esperanto. At the close of the meeting I asked him how it was possible that he could converse with me in the international tongue, and he said it was because of the similarity of Esperanto to his mother-tongue, Italian. He said that he found it easier to use Esperanto than English. Imagine using any national language after having had two lessons!"

En malgranda vilaĝo logas razisto,
kiu razas ĉiujn virajn vilaĝanojn, escepte
de tiuj, kiuj razas sin mem.

Kiu, do, razas la raziston? S.

DANUBO

An excellent thirty-two page monthly, published WHOLLY IN ESPERANTO, as the organ of the ROUMANIAN and BULGARIAN esperantists.

Contains an abundance of good literature, on many diverse subjects, a monthly report of the progress of the Esperanto Movement, etc.

This carefully edited magazine, published in Bucharest, should be among the foreign periodicals taken by every American esperantist.

Have YOU subscribed yet?

Subscription, 80c Sample Copy, 10c

American Esperantist Co.

Washington, D. C.

Wear the Esperanto Badge

It helps esperantists to meet you, helps you to meet them, and does propaganda for the Esperanto Movement by the mere fact that you wear it.

No. 1. Small star with gilt E in center. Lapel button, scarf pin or clasp. A new design, very attractive.

No. 2. Medium sized star with ESPERANTO in center. Lapel button or clasp pin. Same good dark green enamel as No. 1.

No. 3. Large star with E in center. Lapel button or clasp pin.

Price only 25 cents. When ordering, specify whether lapel button, clasp pin, etc., is desired.

White celluloid button, with star and *Lingvo Internacia Esperanto* in green, 10 cents each.

American Esperantist Co., Washington, D. C.

BUY BOOKS WITH A COUPON TICKET

You get \$5.50 in coupons for \$5.00, or \$11.00 for \$10.00. The saving in money is good, but the saving of time is better. Quick and convenient remitting—if you want three books, worth \$1.65, you just cut off \$1.65 in coupons and mail it in. Suppose, as sometimes happens, the 35-cent book is out of print—back comes a 35-cent string of coupons and the transaction is closed. No waiting at the post office window for a money order!

Convenient? That's where we get even—it's so convenient that it makes ordering books a positive pleasure.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

“Cu vi kontraŭstaras ĉapelpinglojn por la virinoj?”

“Nu, mi jam faris tion, kelkajn fojojn?”

El la angla tradukis J. H. HEALD.

ESPERANTO STATIONERY

Fine quality paper with engraved green star and word “Esperanto.”

One quire, with envelopes to match, 65c. postpaid.

Sample sheet and envelope, 4c.

American Esperantist Company

ESTAS MALFERMITA ABONO AL

„La Ondo de Esperanto“

(Iaŭ la adres: Moskvo, Rusujo, Tverskaja, 26) Dum la IV-a jaro de sia regula funkciado „La Ondo“ **senpage** donos al siaj abonantoj, krom **12 n-roj** (16—20 paĝaj) la speciale por tiu celo tradukitan de s-ino M. Sidlovskaja ĉefverkon de rusa literaturo:

„Princo Serebrjanij“ de TOLSTOJ

(352-paĝa, grandformata librego, kies prezo por la neabonantoj estos afrankite Sm. 1,60) Literat. konkursoj kun monpremioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Beletristiko origin. k. traduk. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako. Korespondo tutmonda (pošt. ilustr.).

La abonpagon (2 rubl.=2,120 Sm.) oni sendu al „Librejo Esperanto“ (26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo) aŭ al aliaj Esper. librejoj, poštmandate, respondkupone, papermone aŭ per bankĉekoj.

Send subscription (\$1.10) through American Esperantist Company, Washington, D. C.

Kolektu Postmarkojn!

100 diversaj fremdaj postmarkoj,
afrankite, Sd. 10.

Washington Stamp Co., Box 2466, Washington, D. C.

DEZIRAS KORESPONDIDI

[Unufoja anono kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anono kostas 50c. (1 Sm.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 42 literojn punktojn aŭ spacojn.]

S-ro Wm. Mason, Cashier Educational Dept., Albany, N. Y.

S-ro G. Kurkovskij, Ujezdnoe Zemstvo, Ufa, Russia, P. K., P. M. ĉiam respondos.

S-ino Leila Wainman, Eldred, Pa., Ĉiam respondos.

S-ro Earle Stratton, 122 E. 3rd St., Jamestown, N. Y.—ĉefe kun fremduloj.

S-ro I. L. Zakharov, Andronievskaja pl 5-9, Moscow, Russia, I. P. K.

F-ino Jane Cop, Abdij St., 191, Antwerp, Belgium, per I. P. K. kun amerikaj fraŭlinoj.

S-ro T. J. Benitez, Poste Resta, Mexico, D. F. Mexico.

S-ro W. Thien, Oregon City, Oregon, I. P. K., P. M.

S-ro W. W. Milewski, U. S. M. C., U. S. S. Rhode Island, pri teosofio, terkulturo, kaj Esperanta movado en la tuta mondo.

Printing ? ? ? ESPERANTO or ENGLISH

Have your work done by the first and best Esperanto printer in America. Clearly accented type. Skilled workmen. Modern machinery. Prices low. Workmanship careful. Material good. Letterheads for Esperanto societies and officers.

ERNEST F. DOW, W. Newton Sta., Boston, Mass.

GERMANA ESPERANTISTO

La gazeto aperas en *du eldonoj*, kiuj duonmonate alternas.

Eldono A, eliranta la 5 an de ĉiu monato, celas la propagandon por Esperanto.

Eldono B, eliranta la 20 an de ĉiu monato, estas pure literatura.

Send subscription (\$1.15) through American Esperantist Company, Washington, D. C.